En mia profesia kariero en miaj ambaŭ laborejoj, do kaj en la Nacia Petrola Korporacio kaj en la parlamenta Kontrola kaj Aŭditora Oficejo mi regule uzis Esperanton por konstrui pli vastajn internaciajn rilatojn utilajn por miaj oficejoj. Pri miaj rezultoj en tiu faktereno mi publikigis artikolojn en la hungara ĉefministra organo kaj ankaŭ en la revuo de la Financa Ministrejo. Tiel evidentiĝis por la legantoj kaj ankaŭ por la estraro de niaj registaraj institucioj, ke je la fino de la dudeka jarcento Esperanto jam estis utila ilo por konstrui efikajn internaciajn sciencajn, fakajn, kulturajn kaj ekonomiajn rilatojn.

Dum la lastaj jaroj mi kutime pasigis kelkajn semajnojn aŭ monatojn en Seulo, proksime al Namsan. Tie troveblas la centro de la Seula Esperanto-Kulturcentro, kies prezidanto Lee Jungkee estas docento de du koreaj universitatoj, instruante tie la internacian lingvon. Krom tiu laboro li regule organizas specialajn konferencojn por lingvistoj kaj lingvoinstruistoj kaj preparas diversajn kulturajn kaj religiajn renkontiĝojn. Dum la lastaj jaroj oni regule petis min prelegi en tiuj eventoj kaj ankaŭ tie mi sukcesis konstrui pli novajn kunlaborojn kun ĉinaj kaj japanaj universitatoj kaj sociosciencaj organizoj. Samtempe mi regule kunlaboras ankaŭ kun profesoroj de mia Nanzan Universitato en Nagoya, same kiel kun la estraro de la Internacia Kongresa Universitato en la vjetnamia ĉefurbo en urbo Hanojo.

Estas granda honoro por mi kaj grava evento por la hungara esperantista komunumo, ke koreoj tre ofte akceptas mian inviton, tranoktas en mia modesta hejmo en Budapeŝto kaj disvastigas la korean kulturon en mia lando. Speciale grava evento estis, ke fama artpentristo Ho Song organizis sukcesan ekspozicion en mia urbo, eĉ donacis valoran pentraĵon al la Hungara Esperanto-Asocio. La membroj de la Budapeŝta Centra Klubo bone rememoras, kiel entuziasme klarigis s-ino LEE Hyunmi (Esther) la korean instrusistemon de alternativa edukado kiam ŝi vizitis Budapeŝton kun siaj filinoj. Ankaŭ Sin Young (Leo, filo de Songanta) signife ĝojigis nian komunumon, kiam li partoprenis konferencojn en nia lingvotendaro en orienthungara urbo Nyíregyháza. La vizito de Kara An kaj Roza (edzino de Kara An) estis ne nur interesa kaj agrabla evento por la budapeŝtaj esperantistoj, sed ĝi estis ankaŭ tre utila kaj informplena. Antaŭe multaj homoj en nia komunumo sciis nenion pri la anarkia movado, sed laŭ iliaj

klarigoj ni komprenis, ke anarkistoj intencas evoluigi demokration kaj ili klopodas plibonigi la socion. Persone por mi la vizito de Min Ohkkyeong (Dumina) estis la plej memorinda afero. Ŝi bonkore instruis nin kuiru bongustajn koreajn manĝaĵojn kaj mi kun ĝojo konstatis, ke ankaŭ en la riĉa Koreio estas homoj, kiuj preferas modeste vivi same kiel mi. Estis kutimo kaj en ŝia kaj mia familioj ne elĵeti manĝeblajn materialojn kaj dufoje fari teon el la sama herbo. Sed mi devas diri, ke ŝi estis ne nur instruema, sed ankaŭ diligenta kaj lernema. Kiam hungara manĝaĵo speciale plaĉis al ŝi, tiam ŝi diligente skribis la kuirmetodon, kiel oni preparas la manĝaĵon. Mi miris, kiel diligente ŝi vizitis ĉiujn muzeojn en Budapeŝto, kaj mi konkludis, ke post la fino de ŝia vizito en Hungario kaj Aŭstrio ŝi pli bone scios la eŭropajn arton kaj kulturon ol multaj eŭropanoj.

Pere de miaj vizitoj en Orienta Azio kaj pere de la vizitoj de orientazianoj en mia urbo, do pere de mia vasta internacia kunlaboro mia vivo signife ŝanĝiĝis. Jam ne plu necesas por mi aĉeti la plej malmultekostan trajnbileton kaj mi tute libere povus rezervi ĉambron por mi en kvarstela aŭ kvinstela hotelo dum miaj alilandaj vojaĝoj. Malgraŭ tio mi preskaŭ neniam faras tion. Fakte mi jam alkitimiĝis al la modesta vivo kaj eĉ en mia nova situacio mi ne facile povas ŝanĝi mian kutiman modestan vivostilon.

Vojaĝante en Japanio, Ĉinio kaj Koreio mi kun ĝojo konstatas, ke mi jam povas legi la skribaĵojn sur la muroj en tri lingvoj (foje eĉ en kvar lingvoj), do angle, japane, ĉine kaj koree. Kaj la plej grava rezulto por mi estas, ke mia taglibro estas plena kun internaciaj kulturaj, sciencaj kaj fakaj programoj, en kiuj mi estas petata prelegi pri miaj spertoj en ekonomio, financa kontrolo, lingvistiko, religio kaj kulturo. Tiun sukceson mi atingis pere de mia studprogramo en Nanzan Univ., pere de mia kunlaboro kun gravaj ĉinaj kaj koreaj universitatoj, akademioj kaj kulturaj organizoj kaj pere de helpo de la internacia lingvo Esperanto. Kiam mi prelegis en la japana kongreso en Tokyo antaŭ du semajnoj, mi diris, ke en 2013, en la jaro de la centa jubilea Japana Kongreso de Esperanto oni povas diri, ke la japana Esperanto-movado estas forta movado, kaj la agado tie estas tre utila, kaj mi persone dankas, ke pere de mia kunlaboro kun la japanaj esperantistaj organizoj grande riĉiĝis mia vivo kaj per tiu kunlaboro mi povis atingi gravajn sukcesojn en mia profesia kariero. Ĉi tie en la urbo Incheon mi povas konkludi same, eĉ mi povas aldoni, ke dum

la lastaj jaroj la Esperanto-movado estas pli sukcesa en Koreio ol en Japanio.

Mi persone spertis tion, kiam mi partoprenis la altnivelan konferencon de aziaj lingvoinstruistoj en la urbo Iksan kaj kiam mi ĝuis la enhavriĉan programon de la Internacia Meditada Renkontiĝo en la religia kaj kultura centro de Ŭonbulismo. Spertante la amikecan etoson, renkontante la bonkorajn koreajn geamikojn, gustumante la bongustajn spicajn orientaziajn manĝaĵojn kaj rigardante la belegajn parkojn ĉirkaŭ la famaj budismaj preĝejoj mi sentis, ke viziti tiun belan landon unufoje ne sufiĉas. Pro tio mi regule revenas ĉi tien, tiuj vizitoj estas valoraj partoj de mia vivo.

Mi povas raporti al vi, ke tiuj bonaj travivaĵoj riĉigas kaj ĝojigas ne nur mian vivon, sed ankaŭ la vivon de la hungaria esperantista komunumo. Post miaj koreaj vizitoj multaj eŭropaj institucioj (bibliotekoj, universitatoj, Esperanto-kluboj, ktp) petas, ke mi prelegu pri miaj spertoj. Informiĝante pri la riĉa korea kulturo multaj eŭropanoj decidas rigardi koreajn filmojn, kelkaj eĉ komencas kuiru koreajn manĝaĵojn kaj foje-foje ekzercas korean gimnastikon. Post mia prelego pri la meditada renkontiĝo ĉiuj ĉeestantoj kune ekzercis la 108 riverencojn de la Ŭonbulisma ceremonio en Budapeŝto.

Nuntempe kelkaj ĵurnalistoj kritikas Esperanton, ke ĝi ne sukcesis fariĝi vera mondlingvo dum pli ol cent jaroj. Malgraŭ tio mi asertas, ke kvankam Esperanto ankoraŭ ne estas vera mondlingvo, sed la internacia E-movado jam ekzistas kaj



Ekzercado de korea meditada metodo en Budapeŝto

en multaj landoj tre bone prosperas. Mi povas diri, ke Esperanto havas ŝancon estiĝi vera mondskala interlingvo iam en la estonto. Se tio ne sukcesis dum la unuaj cent jaroj, estas ŝanco, ke tio realiĝu en la dua, aŭ en la tria centjara epoko, same, kiel okazis en la historio de Kristanismo. Je la komenco, kiam Jesuo Kristo fondis tiun novan religion, estis nur kelkcent homoj, kiuj apartenis al tiu komunumo. Eĉ cent jarojn post ĝia fondo la kristana eklezio estis oficiale neakceptita en la tiama mondo. Sed en la unua parto de la kvara jarcento la situacio multe ŝanĝiĝis. Tiam Granda Konstantino, la romia imperiestro, deklaris ke Kristanismo estu oficiale akceptita kaj poste ĝi fariĝis oficiala ŝtatreligio en la tuta Romia Imperio. Poste ĝi estis la plej granda religia organizo en la okcidenta mondo kaj nuntempe jam 2.2 miliardoj da homoj, triono de la homaro, apartenas al la diversaj kristanaj eklezioj de la mondo. En la dudekunua jarcento jam preskaŭ la tuta homaro scias aŭ aŭdis ion pri la instruo de Jesuo Kristo.

Do, ni esperu, ke iam en la estonto la homaro komprenos, ke pro sia neŭtraleco, facileco kaj logika gramatiko Esperanto povas esti taŭga komunikilo por fariĝi ĝenerale akceptita interlingvo en la tuta mondo. Tio estas nur malproksima celo, sed la lernado de la internacia lingvo jam ankaŭ en nia nuna vivo estas tre utila kaj fruktodona. La lernado de Esperanto estas dumviva okupo, sed estas grave kompreni, ke la lernado signifas ne nur lingvolernadon. Per la lerno kaj uzo de Esperanto ni facile povas konstrui bonajn internaciajn rilatojn kaj povas amikiĝi kun multegaj amikecaj homoj en la tuta mondo. Tiamaniere ni povas pli bone kompreni la mondon en kiu ni vivas, kaj farante tion ni povas nekredible signife riĉigi kaj valorigi nian vivon. ☩

– Biografio –

- Studis en Nanzan Universitato en la urbo Nagoya, 1982.
- Regule partoprenis konferencojn kaj kunvenojn en universitatoj kaj diversaj sociaj organizoj.
- Invitis al Budapeŝta Univ. 3 aziajn profesorojn: So Gilsu el Koreio, Shen Chenru el Ĉinio kaj Mizuno Yoshiaki el Japanio.
- Doktorigi en la Budapeŝta Ekonomika Universitato.
- Laboris kiel strategia manaĝero en la Hungara Nacia Petrola Korporacio.
- Laboris por la hungara parlamenta Kontrola kaj Aŭditora Oficejo.
- Redaktoro de hungara komputteknika periodaĵo pri orientaziaj temoj.
- Nun emeritiĝis.

● Kongresa Universitato II

Historio de reforma movado de Esperanto

KAWANISI Teturou (Japanio)

Jam pasis 125 jaroj ekde publikiĝo de Esperanto antaŭ mondo. Ni konstatas, ke Esperanto nun funkcias bone ne nur kiel lingvo de interkomunikado, sed ankaŭ kiel lingvo de kulturo. Tamen, se ni detale retrorigardas ĝisnunan historion de Esperanto—movado, ni ankaŭ konstatas, ke por atingi nunan stadion Esperanto devis travivi kelkajn krizajn momentojn kiel lingvo. Profitante tiun ĉi okazon, mi volus vidi kaj pensi kun vi denove, kiaj estis tiuj krizoj, por certigi al ni, kio estas Esperanto kiel lingva komunikilo de tutmondo.

(Bildo 1) Dum Zamenhof vivis kiel esperantisto, li proponis trifoje reformojn de Esperanto sub influo de tiamaj diversaj cirkonstancoj, nome, unue en 1888, unu jaron post apero de Esperanto, due en 1894 kaj laste en 1907 okaze de Ido—skismo. Ni rigardu sinsekve la reform—proponojn de Zamenhof.

(Bildo 2) Kiam Zamenhof aperigis Esperanton kiel Internacian Lingvon por la unua fojo en 1887, li diris, ke li prezentos tiun ĉi lingvon en tempo de unu jaro por la tuta mondo por ricevi kritikojn kaj plibonigojn antaŭ ol eldoni plenan vortaron, libron kaj gazeton. En 1888 Zamenhof proponis la unuan reformon en la tria libro, nome, ‘Aldono al la dua libro’. Tio estas nova enkonduko de vortoj de zamenhofa tabelo: iam, tiam, kiam, neniam. Originale tiuj ĉi estis ian, tian, kian, nenian. Ekzemple en la dua libro, kiu eldoniĝis 6 monatojn post la unua libro, skribiĝis tiel la teksto de la traduko de ‘La ombro’ de Andersen: ‘Kian la suno estis subirinta, ili reviviĝis.’ Nun la teksto estas: ‘Kiam la suno estis subirinta, ili reviviĝis.’ Kaj krome Zamenhof rekomendis uzi digramon (du literoj por unu sono) kaj simple u, nome, ch, gh, hh, jh, sh, kun aldono de h kaj u anstataŭ supersignitaj literoj por faciligi laboron de presado.

(Bildo 3) En 1894 Zamenhof faris la 2an proponon de reformo de Esperanto. Antaŭ ol klarigi la enhavon de reformo, mi volas diri kelkajn vortojn pro tiama

cirkonstanco. En tiu tempo Zamenhof eldonadis la periodan revuon 'La Esperantisto' kun multe da financa subteno de germana esperantisto, W.H.Trompeter. Tiam Trompeter trudis al Zamenhof, ke li pritraktu pozitive reformon de Esperanto, ĉar Trompeter memoris, ke antaŭe Zamenhof promesis, ke li ekzamenos plibonigojn de Esperanto 5 jarojn poste. Trompeter eĉ minacis Zamenhof, dirante, ke li ne plu faros financan subtenon, se Zamenhof ne pritraktas la aferon de reformo. Do, li devis publikigi proponon de reformo surbaze de opinioj de reformo-dezirantoj kaj planis decidi reforman problemon per voĉdono de abonantoj de la revuo 'La Esperantisto', kiuj nombris ĉirkaŭ malpli ol 500-n. Enhavo de la reformo estis jene: ① Forigo de supersigno. ② Forigo de la artikolo 'la', kiun ne konas slavo en siaj lingvoj ĝenerale. ③ Forigo de akuzativo. ④ Substantiva pluralo estas '-i' anstataŭ '-oj'. Ekzemple 'libroj' fariĝas 'libri'. **(Bildo 4)** ⑤ Forigo de akordo de vortofino inter adjektivo kaj substantivo. Ekz. 'belaj libroj' fariĝas 'bele libri'. ⑥ Adjektivo kaj adverbo havas komunan finaĵon 'e', kio estis reformo de Trompeter. 'Bonaj patroj kantas bone' fariĝas 'Bone patri kanten bone'. ⑦ Participo aktiva kaj pasiva estas nur '-ente' kaj '-ate', ⑧ Forigo de tabel-vortoj: 'ĉiu, kiel, tiel, ĉiam' fariĝas 'omnu, kom, sik, semper'.

(Bildo 5) La rezulto de la voĉdonado de 2 fojoj, kiu daŭris 6 monatojn, estis jena. 157 personoj voĉdonis por Esperanto sen reformo. 11 voĉdonis por la reformo de Zamenhof. 3 voĉdonis por alia reformo. Kaj 93 voĉdonis por la reformo de Zamenhof kun aliaj reformoj. Do, nuna Esperanto povis postvivi pro subteno de ĉirkaŭ 60 procentoj de voĉdonantoj.

(Bildo 6) Kiel vi scias, en 1907 okazis skismo de Ido. Mi volas koncize preparoli la historion de Ido-skismo. En 1900 Universala Ekspozicio okazis en Parizo kaj fondiĝis Internacia Ligo de Akademianoj de tutmondaj sciencistoj. Tiam franca sciencisto esperantista, Louis Couturat, havis la ideon fondi la Delegacion por alprenado de helplingvo internacia, por ke ĝi kolektu subten-subskribojn de plejeble multaj sciencistoj por peti tiun Internacian Ligon de Akademianoj ekzameni la problemon de mondlingvo. Malgraŭ subskribo de 1251 profesoroj kaj 307 sciencaj societoj ĝi finfine rifuzis tiun peton en 1907. Do, Li fondis la Komitaton de Delegacio konsistanta el 14 membroj kaj ĝi gvidis la

kunvenon de dek tagoj por ekzameni diversajn projektojn de internacia lingvo. Sub ĝi elektiĝis Konstanta Komisiono el 5 membroj, kiuj decidis agnoski la lingvo-projekton prezentitan en anonimo de Ido. Kelkajn monatojn poste Louis Beufont konfesis publike, ke li estas Ido. Sed evidentiĝis poste, ke reala Ido estis Luis Couturat. Inter membroj de Konstanta Komisiono estis tiel famekonata sciencisto de kemio, Wilhelm Ostwald, ke li poste ricevis Nobel-premion pro sia kemia studo. Por pacigi la aferon precipe kun Ostwald, Zamenhof proponis la 3an reformon ĉi-foje unue al Lingva Komitato de Esperanto.

(Bildo 7) La reformo estis jena. ① Supersignitaj literoj povas esti ch, gh, jh, sh, k, u anstataŭ ĉ, ĝ, ĵ, ŝ, ĥ, ŭ. ② Originalaj adverboj de ‘-aŭ’ povas esti ‘-e’. ‘Hodiaŭ, hodiaŭa’ povas ŝanĝiĝi al ‘hodie, hodia’. ③ Por esprimi direkton uzu prepozicion ‘al’. ‘Iri Parizon, ĉi tien!’ esprimiĝas per ‘iri al Parizo, al ĉi tie’.

(Bildo 8) ④ Ne necesas akordo de adjektivo kaj substantivo en kazo kaj pluralo. ‘Viaj bonaj infanoj amas siajn gepatrojn’ fariĝas ‘Via bona infanoj amas sia gepatrojn.’ ⑤ Land-nomo povas uzi ‘-i’ anstataŭ ‘uj’. ⑥ Enkonduko de novaj afiksoj kaj vortoj: aĉ(malestimo), oz(multeco), kum(kolektivo), sperti(esperi), stati(farti), sukro(sukero), et(kaj). Tiam Lingva Komitato de Esperanto rifuzis akcepti la proponon de Zamenhof. Do, tiu propono ne prezentiĝis en la kvara U.K. en Dresdeno.

(Bildo 9) Fine ni rigardu trajton de Ido. ① Forigo de supesigno kaj enkonduko de ‘q, w, x, y’. Shuo(ŝuo), exemplo(ekzemplo), voyo(vojo). ② Forigo de akuzativo. ‘Kato trinkas lakton.’ fariĝas ‘Kato trinkas lakto.’ ③ Substantiva pluralo ‘-oj’ fariĝas ‘-i’. Adjektivo antaŭ substantivo ne varias. ‘La belaj domoj’ fariĝas ‘la bela domi’. **(Bildo 10)** ④ Vortofarado per derivado (sed per kunmetado en Esperanto). Ŝtona statuto (ŝtona statuto), ŝtonala industrio (ŝtona industrio), ŝtonoza voyeto (ŝtona vojeto). ⑤ Ŝanĝo de verboformoj. Me povas trinkar. (Mi povas trinki.) Me dicis. Me dicabis. (Mi diris. Mi estis dirinta.) Me amesas. (Mi estas amata.) **(Bildo 11)** ⑥ Forigo de tabelvortoj. Kande(kiam), omnu(ĉiu), sempre(ĉiam), nulaloke(nenie), pro quo(kial). ⑦ Refarado de tuta leksikio. Spozo(edzo), leda(malbela), mikra(malgranda), kurta(mallonga), ucelo (birdo), regretar(bedaŭri), kozo(aĵo).

Ni povas diri, ke principoj de lingva koncepto inter Ido kaj Esperanto estas absolute malsamaj. Ido kreiĝis sur bazo de derivado kaj fleksia gramatiko, matematike preciza teorio sur eŭroplingva-stilo. Esperanto kreiĝis sur bazo de kunmetado, aglutina kaj izola lingva stilo. En Esperanto ĉiuj vort-elementoj estas memstaraj, inkluzive de eĉ finaĵoj. Simpla kunmeto de memstaraj-vortoj estas la plej grava principo, kiu estas plej facile komprenebla por ĉiuj ne nur eŭropaj, sed ankaŭ ekster-eŭropaj. Por kompreni la lingvon de Ido ĝuste oni devas anticipi scii almenaŭ unu eŭropan lingvon leksikologie. Do Ido estis por kleruloj. Oni povas diri, ke Ido estis ne reformo de Esperanto, sed misformo de Esperanto, kiel Andre Cherpillod indikis.

(Bildo 12) Unue ni vidu avantaĝon de akuzativo de Esperanto. Pronomoj de angla lingvo havas akuzativon, tamen ĝiaj akuzativaj formoj estas diversaj, havante nenian regulon. En Esperanto akuzativa formo kreiĝas simple kaj regule per aldono de la akuzativa signo 'n' al nominativo. Alia ekzemplo. Angle 'A cat eats a rat.' kaj inverse 'A rat eats a cat.' Tiuj ĉi du frazoj malsamas sence. En la lasta frazo povas esti, ke a rat eats a dead cat. 'Kato manĝas raton' kaj 'Raton manĝas kato.' En Esperanto du frazoj estas samaj dank' al ekzisto de akuzativo. 'Rato manĝas katon.' En tia okazo estas certe, ke rato manĝas mortintan katon. En angla lingvo vorto-ordo en frazo jam estas gramatika. En Esperanto vorto-ordo estas relative libera.

(Bildo 13) Ni vidu alian avantaĝon de akuzativo de Esperanto. Dank' al akuzativo de adjektivo ni povas fari jenan esprimojn distinge. 'Mi trovis la monon perditan.' Tio estas, ke mi bonŝance trovis la monon, kiu estis perdita. Granda feliĉo! Sed, se ni senakuzativigas adjektivon, 'Mi trovis la monon perdita.' Tio estas, ke mi trovis, ke la mono estas perdita. Granda malfeliĉo!

(Bildo 14) Ni vidu plue alian avantaĝon de akuzativo, kiu precizigas sencon de frazo. 'Li akceptis tiun homon kiel reĝon.' Ĉi tiu frazo diras, ke tiu homo fariĝis reĝo. 'Li akceptis tiun homon kiel reĝo'. Tiu frazo diras, ke li mem estas reĝo.

(Bildo 15) Ni vidu ankaŭ avantaĝon de akordo de pluralo inter adjektivo kaj substantivo. 'Venas la filoj de mia amiko ĵus reveninta el Eŭropo.' En tiu ĉi

frazo ni komprenas, ke mia amiko ĵus revenis el Eŭropo. Alie, ‘Venas la filoj de mia amiko ĵus revenintaj el Eŭropo.’ En tiu ĉi frazo ni komprenas, ke la filoj ĵus revenis el Eŭropo, dank’ al ekzisto de plurala signo de adjektiva participo.

(Bildo 16) Multaj homoj kritikis supersignitajn literojn. Tamen ideo pri supersignitaj literoj estis klara al Zamenhof. Por faciligi memoradon de literumo de Esperantaj vortoj li enkondukis tre klaran principon, ke unu litero respondas al unu sono kaj inverse unu sono respondas al unu litero. Jam de la komenco Zamenhof ne havis ideon esprimi sonon per digramo, nome, du literoj. Al kleruloj, kiuj jam konas kelkajn eŭropajn lingvojn, supersignitaj literoj aspektas strangaj, tamen al homoj ekster Eŭropo ili aspektas facile kompreneblaj. Grave estas, ke Zamenhof deziris mondlingvon en vera senco por ĉiuj, ne por parto da kleruloj. En 1905 en la deklaro de esenco de Esperantismo Zamenhof proponis fiksi Fundamenton de Esperanto netuŝebla. Tio estas, ke unue Zamenhof deziris, ke la principoj de la lingvo Esperanto ne difektiĝu per arbitraj senpripensaj agadoj. Li akcentis, ke eĉ Zamenhof mem jam ne rajtas tuŝi tiun Fundamenton. Tio estas, ke li deziris havigi al Esperanto lingvan tradicion surbaze de principo de kunmetado de memstaraj vortoj. Ĉar, se temas pri naturaj lingvoj, historia tradicio garantias al ili bazan stabilecon por evoluo. Ni konstata, ke nun Esperanto estas jam lingvo, kiu funkcias diverscele samkiel naturaj lingvoj, havante firman tradicion. ☞

- Biografio -

- Eklernis korean lingvon okaze de la UK en Seulo.
- Naskiĝis en Kanazawa en 1944.
- Esperantiĝis en 1962 (unuagradano de medicina fako de ŝtata univ. Kanazawa).
- Partoprenis en la 50a UK en Tokio en 1965.
- Nun laboras por Esperanto kiel unu el estraranoj de JEI ekde 2007.
- Estis estro de Kanazawa Rehabilitation Hospital ekde 1986.
- Emeritiĝis de posteno de hospital-estro en 2006.
- Hobioj estas ekzerco de Taegukkwon, lerno de korea lingvo. kaj studo pri vivhistorio de Zamenhof.

Simpozio

- Esperanto kiel dumviva lernado -

Gvidanto : SO Jinsu

Dato: okt. 27. 2013



MA Youngtae
(Koreio)



YAMASITA Toshihiro
(Japanio)



SHIN Eunsook
(Koreio)

Esperanto kiel dumviva lernado

MA Youngtae

Membro de Akademio de Esperanto

—Enkonduko—

Edukado kaj lernado estas tiel gravaj aferoj en nia vivo, ke multaj famaj homoj donis al ni jenajn bonajn dirojn kiel juveloj: M.T. Kiero diris, ke kiel nutraĵo estas nepre necesa por korpo, tiel same edukado estas nepre necesa por nia menso; L.A. Seneka diris, ke oni lernas ne nur en lernejo sed ankaŭ en nia vivo; Bahaussra diris, ke homoj havas du flankojn: la animala kaj la anĝela.

La celo de edukado estas trejni la animon de homoj, por ke la anĝela flanko venku la animalan; Ŝekspiro diris, ke homo ekmaljuniĝas tuj en la momento ĉesi lernadon; Aristotelo diris, ke edukado estas la plej bona nutraĵo por maljunuloj.

Do, estas tre signifoplene, ke ni havas tiun ĉi simpozion sub la titolo *Esperanto kiel dumviva lernado*.

1. Difino de dumviva lernado

1) Kio estas dumviva lernado?

Dumviva lernado signifas, ke homoj devas lerni dum sia tuta vivo krom la lerneja lernado, ne limigante la aĝojn kaj seksojn, per la edukado en hejmo kaj en socio.

2) De kiam komenciĝis dumviva lernado?

Oficiale: Tiu ĉi eduk-teorio de dumviva lernado estis rekomendita de la komitato de adolta edukado de Unesco en 1967. Do, korea kuranta konstitucio akceptis la rekomendon, kaj diris, ke "la ŝtato devas evoluigi la dumvivan edukadon", kaj faris leĝon pri la eduksistemo, administrado kaj financa afero por ĝi. Kaj por efikigi (validigi) la leĝon la registaro faris la leĝon de socia edukado, kaj nun la koresponda edukado de televido—elsendo kaj radio—elsendo

estas plenumata ekde la jaro 1972.

Individue: Individue, oni povas komenci la dumvivan lernadon jam de sia infana tempo en sino de sia patrino, kaj ekster lernejo oni povas rigardi ĉiajn ĉirkaŭaĵojn kiel la ejon por la dumviva lernado.

La *Analektoj de Konfuceo* (論語) diras: Kie tri homoj kune vojiras, tie nepre troviĝas mia instruisto. Rilate al bona homo, oni povas lerni ion imitante lin, kaj rilate al malbona homo, oni povas preni lin kiel homon, kiun oni ne devas imiti. (三人行必有我師焉 擇其善者而從之 其不善者而改之). Do, laŭ Konfuceo, ni povas trovi niajn instruistojn, kien ajn ni iras. —論語, 述而篇

3) Kion ni devas prepari por dumviva lernado?

Ordinare en la kurso por dumviva lernado en Koreio partoprenas ĉefe ne junaj studentoj sed la homoj mezaĝaj aŭ maljunaj. Do, unue ni devas elpensi taŭgajn lernolibrojn, kiujn ili povas facile kompreni, kaj due ni devas eduki kaj naski kapablajn instruistojn, kiuj povas bone instrui Esperanton al ili.

Kiam la lernolibroj kaj instruistoj estas pretaj, ni sendu la oficialajn leterojn al la Centroj de Dumviva Edukado en municipaj urboj de la tuta lando, kaj rekomendu enkonduki Esperanton, kiel unu el la instruobjektoj, kaj malfermi la kurson de Esperanto.

2. Kia estas Esperanto kiel dumviva lernado?

1) Por kio vi lernis Esperanton (celo)?

Mi komencis lerni Esperanton en la jaro 1966 kun kelkaj modestaj sonĝoj.

- (a) Por amikiĝi kun multaj homoj en diversaj landoj sen lingva obstaklo.
- (b) Por interŝanĝi informojn sen lingva malfacilo.
- (c) Por mondvojaĝi renkontante fremdajn amikojn sen lingvoproblemo.

Konklude, mi fariĝis esperantisto por vivi kiel unu membro de la familio de mond-vilaĝo, ĝuante la liberan komunikadon kun ĉiuj homoj de la mondo.

2) Kiel vi nun utiligas (viaj spertoj)?

- (a) Kiam mi estas juna, mi vojaĝis eksterlanden por partopreni en Esperanto-kongresoj: UK kaj landaj kongresoj, kaj por instrui Esperanton aŭ prelegi en Esperanto.

Sed nun estante iom maljuna, mi instruas Esperanton en Universitato kaj en interreto utiligante la reton de Skajpo.

- (b) Mi uzas Esperanton por amikiĝi kun fremdlandaj esperantistoj pere de Skajpo. Nun mi havas amikojn en Skajpo en la landoj Usono, Japanio, Ĉinio, Francio kaj Hungario.
- (c) Kaj mi verkas esperantajn librojn por helpi al la junaj esperantistoj altigi la Esperanto-kapablon. Lastatempe mi publikigis la novan verkon “Idiotismoj, esprimoj kaj kvizoj de Esperanto”.

3) Ĉu Esperanto estas inda por dumviva lernado? (Se jes, kial?)

Absolute jes! Ju pli homoj maljuniĝas, des pli malvigliĝas la funkcioj de iliaj cerboj. Estas jam pruvite, ke lernado de lingvoj helpas al homoj teni la cerbon en bona stato. Precipe, lerni lingvojn en maljuna aĝo helpas al homoj vigligi la funkcion de cerbo kaj malfruigi la venon de demenco.

En la jaro 2007, la Asocio de kanadaj sciencistoj oficiale publikigis la rezulton de la 4-jara esplorado, rilate al la proporcio de malsaniĝo je demenco ĉe la du grupoj: unu-lingvanoj kaj du-lingvanoj. Prof. Bijalistok en la universitato Toronto diris en la raporto de la speciala sciencisto, ke en la procezo uzi du lingvojn la cerbo tre vigliĝas kaj saniĝas. Eĉ li mem tre miris pri la rezulto.

Precipe, lernado kaj praktikado de la lingvo Esperanto estas bona por mensa sano. Utiligante Esperanton, oni povas havi kontaktojn kun tutmondaj homoj super landlimoj, dank' al interreto. Do, praktikado de Esperanto estos la plej bona tempopasigo por maljunuloj aŭ emeritoj, kaj uzante du lingvojn, korean kaj esperantan, oni havos la agrablan sperton pri malrapida maljuniĝo de korpo kaj de cerbo.

3. Malgraŭ tio, nur malmultaj esperantistoj estas en la mondo.

1) Kial multaj homoj en la mondo ne lernas Esperanton?

Jen estas la kialoj:

En la ombro de la fortega potenco de angla lingvo nia amata lingvo Esperanto nun estas preskaŭ sufokata. Homoj preferas lerni anglan lingvon por trovi laborejon kaj por studi diversajn sciencojn. Imagu, ke 85% el la tutmondaj disertaĵoj estas publikigitaj en angla lingvo, kaj la komuna lingvo de Internacia

Aviada Asocio estas angla lingvo. Do, estas fakto, ke nun la angla lingvo ludas tre gravan rolon en internacia socio, kvazaŭ ĝi estus internacia lingvo.

2) Kial multaj homoj eĉ ĉesas ĝian lernadon?

- (a) Ili ne plu havas intereson pri Esperanto, kaj malvarmiĝis ilia entuziasmo por Esperanto.
- (b) Homoj povas ĉesi la lernadon de Esperanto pro okupiteco de reala vivo.
- (c) Aŭ, pro homoj, kiujn ili malŝatas, homoj povus forlasi Esperantujojn. Antaŭ kelkaj monatoj iu esperantisto diris al mi, ke li nun hezitas, ĉu partopreni en tiu ĉi kongreso aŭ ne, ĉar li ne volas renkonti tiun homon, de kiu lia koro estis vundita. Antaŭ ĉio la harmonia rilato inter membroj de la asocio estas plej grava.

4. Rezulte

1) Ĉu vi daŭrigos lernadon kaj utiligon? (Se jes, kial?)

Jes, mi daŭrigos lerni, studi kaj utiligi Esperanton kun jenaj kialoj:

- (a) Ĉar mi amas Esperanton kiel dumviva esperantisto kaj dumviva membro de UEA kaj KEA.
- (b) Por preventi la okazon de demenco mi daŭre utiligos Esperanton, studante ĝin kaj verkante diversajn interesajn esperantaĵojn, ĝis mia sano permesos.
- (c) Por daŭrigi la amikecon kun alilandaj esperantistoj, kaj por interŝanĝi diversajn informojn kun la samideanoj en tutmonda Esperantujo.

2) Ĉu vi volas propagandi Esperanton al aliuloj? (Se jes, kial? kaj kiel?)

Jes! Se ni esperantistoj ne propagandos nek disvastigos Esperanton, baldaŭ la nombro de esperantistaro malmultiĝos tre rapide. La klopodo propagandi estas **ne la afero elektebla, sed la afero deviga**. Se ni propagandos kaj disvastigos Esperanton, Esperanto vivos plu, kaj se ni ĉesos tion, Esperanto malaperos en tiu ĉi mondo.

Ni memoru la faman diron de Ŝekspiro: Ĉu esti aŭ ne esti — tiel staras nun la demando. Ĉu esti aŭ ne esti — tio dependas de ni!

Dum lastaj 40 jaroj multaj esperantistoj forlasis Esperantujojn, aŭ almenaŭ silentis, rigzinante la membrecon de UEA.

jaro	membroj de UEA	malpliigo
1973	7,069명	
1993	5,343명	– 1,726명
2013	3,789명	– 1,554명
Dum 40 jaroj malmultiĝis 3,280 membroj.		

Se ni ne volas ripeti la malkreskon de membraro de UEA kaj KEA, ni devas multe pli klopodi por propagandi Esperanton.

*** Kiel propagandi?**

- (a) Ni montru al neesperantistoj nian modelan ekzemplon kiel bona esperantisto, praktikante Esperanton mondscale.
- (b) Ni estu simboloj de Esperanto, kaj kiam ajn homoj vidas nin, ili ĉiam imagu pri Esperanto.
- (c) Ni rakontu al neesperantistoj pri niaj interesaj kaj valoraj spertoj, kiujn ni akiris pere de Esperanto. Tio certe interesos ilin pri Esperanto.

4) Kion ni instruu?

Por dumviva instruado, ni devas konsideri, kion instrui por kontenta lernado de Esperanto. Esperanto estas ne simpla lingvo por interparoli, sed ĝi havas en si tre noblan idealon, ĉar ĝi estas kreita ankaŭ por realigi la mondan pacon per neŭtrala lingvo. Do, mi pensas, ke Esperanto-edukado devas konsisti ne nur el la lingvo Esperanto, sed ankaŭ el la historio, kulturo, movado, kaj la spirito de Esperanto.

Jen estas la konsiderindaj aferoj por Esperanto-edukado:

Unue, instrui vortojn, gramatikojn, konversaciojn kaj stilon de Esperanto.

Due, prezenti la historion de Esperanto: kiam, kie, kaj de kiu naskiĝis Esperanto.

Trie, prezenti la kulturojn de Esperanto: eldonado de esperantaĵoj, radio- kaj televid-elsendoj, literaturo, agrablaj kantoj originalaj kaj tradukitaj, kaj diversaj didaktikaj ludoj.

Kvare, prezenti la movadon de Esperanto (pri UEA, landaj asocioj, internaciaj kongresoj kaj delegita reto ktp.).

Kvine, prezenti la spiriton de Esperanto: Esperanto estas elpensita kun la spirito por akiri la mondan pacon per neŭtrala internacia lingvo.

Sese, prezenti la soci-ekonomiajn efikojn de Esperanto-movado. Se oni uzas Esperanton anstataŭ angla lingvo, oni povas ŝpari ĉiujare 15 bilionojn da ŭonoj en Koreio, kaj 52 bilionojn da ŭonoj en la tuta mondo.

* Laŭ la statistiko prezentita en la *Manlibro de Esperanto*.

5) Diru pri perspektivo (futuro) de via vivo kun Esperanto!

Oni diras, ke maljunuloj devas daŭrigi la aferojn, pri kiuj ili okupiĝis en sia juna tempo, ĉar tio helpas al ili teni la cerban funkcion en sana stato. Por mi Esperanto kaj vizitado al preĝejo estas tiuj, pri kiuj mi okupiĝis jam de miaj junaj aĝoj.

Do, kiam ajn mi rememoras pri Esperantaj aferoj, t.e. lingvo, vojaĝoj en fremdaj landoj, esperantaj libroj, amikoj en la tuta mondo ktp, kaj preĝejoj aferoj, t.e. diservo, kantado de himnoj, preĝado, legado de Sankta Biblio, la funkcio de mia cerbo fariĝas tre vigla kaj mi sentas min feliĉa. Do, estos nature, ke mi pasigos la reston de mia vivo kune kun Esperanto,

- (a) daŭrigante la bonajn rilatojn kun en- kaj eksterlandaj esperantisto-amikoj rekte renkontiĝante aŭ pere de Skajpo en interreto,
- (b) ĝuante diversajn esperantaĵojn,
- (c) instruante Esperanton kaj verkante necesajn artikolojn kaj librojn,
- (d) relegante miajn librojn, t.e. lernolibroj, vortaroj, manlibro de Esperanto, kaj aliaj referencaj libroj, kiujn mi verkis dum mia vivodaŭro, kaj plibonigante ilin, se tio necesas.

Do, mi timas, ĉu mi povos trovi tempon por maljuniĝi aŭ ne, se mi daŭrigos la esperantistan vivon, farante tiajn 4 aferojn, kiujn mi ĵus menciis. ☪

Dumviva lernado - por kio taŭgas Esperanto?

YAMASITA Toshiro (Belmonte)

Ĉe la komenco mi pardonpetas vin citi nomojn de programeroj okazintaj en la lasta Japana Kongreso centa antaŭ du semajnoj, ĉar ili bone montras kiel estas reale uzata Esperanto. Juĝo de klasifiko estis farita laŭ mia punkto (kun iom da duboj).

	Speco		Nomo de kunsido
1	Hobio / kleriĝo	p	Kantu en Esperanto!, Kulturaj prelegoj, Studraporta kunsido 1,2, Go-ludo
2	Scienco kaj tekniko	p	Vortaro per tabuleta komputilo, Medicinistoj k. Sciencistoj
3	Kvalifiko	c	Ekzameno de JEI (skriba, brajla, parola), Nova Ekzameno de JEI
4	Entreprene trejnado	c	Publika Kurso por Komencantoj Konsilo por Komencantoj Kurso por Ekzercado en Prononcado Parolu Esperante
5	Sporto	p	
6	Refreŝiga aktivado	p	Ekskurso, Ekskurseto
7	Arto kaj kulturo	p	Publika Koncerto, Koncerto de JoMo, Ĝuu muzikilojn el la Mondo Literaturo, Literatura Dialogo, Spertu Japanajn Kulturojn
8	Regionrevivigo	p	Esperanto-domo de Jatugatake
9	Internacia komunikado	p	Amika Vespero, Junularaj Programeroj, Oratora Konkurso Mia Amuziĝaĵo, Amikiĝu per Interreto kun Esperantistoj! Kun Leo kaj JoMo Muziku kaj Dancu, Bankedeto Prelegoj de aziaj invititoj, Pasporta Servo, Por Aziaj Invititoj
10	Volontula aktivado	p	
11	Socia klerigado	p	ILEI-JP Kunsido de la Artikolo 9 (de la Japana Konstitucio) Fakkunsido de Blinduloj, Brajlizado Raporto pri Katastrofo en Japanio Ekspozicio pri la Japana Katastrofo

La 45-a Korea Kongreso de Esperanto

			Ekspozicio “Esperanto – kio estas ĝi?” Prelego “E-o kiel ‘dialoga ponto’ en la mondo kaj en Japanio” Prelego “Esperanto en la moderna historio de Japanio” Prelego de Joel Amis Publika Prelego
12	<i>Srganizo, organizado</i>	c	Prelegoj de Markus Gabor, Prelegoj de Lee Jungkee Prelego pri UEA Prelego “Pri Gustaf Ramstedt” Prelego “Kontribuo de la japana Esperanto-movado al la monda Esperanto-movado” Ĝenerala Kunsido de JEI Esperanto-movado laŭ Drucker Nomvortaro de Esperantistoj Ossaka-Premio Azia Agado Lokaj Esperanto-Societoj Delegitoj Sennacieca Asocio Tutmonda
13	<i>Religio</i>	p	Kristanoj, Budhanoj, Oomoto, Universala Homama Asocio
14	<i>Interkomunikiĝo</i>	p	Solena Inaŭguro, Ferma Soleno, Komuna Fotado, Bankedo

Vi vidas, ke mankas eventoj en sporto kaj volontula aktivado en la tabelo; tio estas iusence bedaŭro, ke kongresejon kolektiĝis esperantistoj nur por renkonti kaj kunsidi, sed ne por ludi tenison kaj golfon, perante Esperanton!

Kaj multaj kongresanoj laboris kiel volontuloj, eĉ iom pagante, ne pagite. Kaj eble vi ankaŭ notiĝis, ke tiel nomata “dumviva lernado” ne inkluzivas “organizadan” kaj “religian” kampojn, kvankam ili estas tre gravaj por nia bonkvalita vivo kaj Esperantujo.

Ofte oni mokas: “Ĉu vi lernas Esperanton? Ho, tio estas utila por nenio, nur perdo de via tempo!” Malgaŭ tio, kial vi komencis kaj kontinuas Esperanton? De rekomendo de amiko? Por trovi amikon aŭ amat(in)on? Por gajni monon? Por ekscii alian mondon? Por vojaĝi eksterlanden? Kun interesiĝo de lingvo? Je konsento al interna ideo? Se ni povos akiri multe da mono per Esperanto, sendube ĉiuj torente utiligos Esperanton kun entuziasmo. Sed en nuntempa socio, tio ne eblas.

Mi emfazu, ke Esperanto estas la “lingvo”. Imagu, ke en korea ĉiutaga vivado neniu eĉ rememoras ĉi tian *strangan* penson: “Nun mi devas paroli en la korea lingvo!” Ĝuste! Lingvo regas ĉiun homan vivadon. En tia vidpunkto, ni revidu la fenomenon ĉirkaŭ Esperanto.

Eesperanta aktivado dividiĝas en du, nome ‘celo’ kaj ‘pero(perilo)’. Jen ekzemploj.

Celo: *Mi faras/lernas Esperanton cele al (poento de universiatio/sukceso de ekzameno/...).*

= *(se mi estas ne lerta en Esperanto, mi klopodu pli diligente.)*

Pero: *Mi faras/lernas Esperanton perile al (kolektado de poŝtmarko/skajpa interparolo/...).*

= *(se mi estas ne lerta en Esperanto, la atingo malfacilus...)*

Reklasifiko laŭ celo/pero

Celo estas E-o	Kvalifiko	Pero al ...	Hobio / kleriĝo
	Entreprene trejnado		Scienco kaj tekniko
	<i>Organizo / organizado</i>		(sporto)
			Refreŝiga aktivado
			Arto kaj kulturo
			Regionrevivigo
			Internacia komuniĝo
			(volontula aktivado)
			Socia klerigado
			<i>Religio</i>
	<i>Interkominiĝo</i>		

Ekzistas diversaj manieroj uzi Esperanton kiel perilo. Sed atentu, ke ni bezonas klopodojn bone organizadi kaj funkciigi organizon, estiel bazo kaj fundamento de tiaj aktivadoj.

Kiu, do, faras tion? – *Ni!*

Kelkvorte mi resumos mian ideon, responde al la peto de la organizanto:

Dumviva lernado estas memvola lernado, do, ĝi komenciĝas de naskiĝo dum vivdaŭro, kiam oni tenas volon kontinui. Se ne multas esperantistoj en la mondo, tio ne estas kulpo de la lingvo mem, sed manko de allogo al peresperanta bona vivo, pro kial ni devas prepari kontentigan rondon kaj organizon, respondece taŭgan por altnivelaj postuloj. ☞

Esperanto kiel dumviva lernado

SHIN Eunsook (Songanta)

1. Pri difino de dumviva lernado
 - 1) kio estas dumviva lernado?
 - 2) De kiam ekkomenciĝas dumviva lernado?
 - post emeritiĝo?
 - junuloj ne povas fari dumvivan lernadon?
 - 3) Kion ni devas prepari por dumviva lernado?

Oni diras, ke lernado daŭras dum tuta vivo. Tio signifas, ke lernado okazas ne nur en la lernejo, sed ankaŭ dum onia tuta vivo. Naskiĝi, manĝi, renkontiĝi, labori, ĉies procedo en la vivo estas lernado mem. Stulte sed logike mi provas difini, ke dumviva lernado estas lernado, kiu okazas dum la vivo. En vasta signifo, pro tio, dumviva lernado komenciĝas ekde la vivo. Laŭ strikta signifo, ĝi komenciĝas, de kiam oni trovas iun temon, kiu motivas sin. Junuloj povus havi pli longan periodon kompare kun maljunuloj kondiĉe ke ili jam trovas sian temon. Ekz. studi klasikan literaturon, filozofion, pedagogion, eble lerni Esperanton. Plie, elektita dumviva lernado ne necesas esti ununura. Iu povus havi kelkajn temojn en sia dumviva lernado kaj la principoj povus esti ligitaj unu kun la aliaj. Ekz. se iu laborus kadre de Justa Komercio, li povus pli aktivigi pri Esperanto ol aliuloj. Ĉar inter ambaŭ agadoj komuna principo temas pri profunda sonĝo al paca mondo. Bedaŭrinde, ne multaj scias, kio estas dumviva lernado por si mem. Pro tio, ne eblas prepari ion antaŭ ol trovi ĝin. Ĉar ĝia preparado funkcias kun ĵus trovita temo, al kiu oni dediĉas sian temon. Tamen laŭ mia sperto, tiuj, kiuj scivolemas pri ĉio al la mondo, havas pli grandan eblecon trovi sian dumvivan lernadon.

2. Kia estas Esperanto kiel dumviva lernado?
 - 1) Por kio vi lernas (celo)?
 - 2) Kiel vi nun utiligas (viaj spertoj)?
 - 3) Ĉu Esperanto estas inda por dumviva lernado? (Se jes, kial?)

Mi delonge laboras kadre de alternativaj lernejoj, jen kiel ĉefino, jen kiel E-instruistino. Por tiuj lernejoj, Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ efika ilo realigi ideon de alternativa vivo. Ekz. pace komunikiĝi kun tutmondanoj, interŝanĝi diverslandajn kulturojn, sincere kompreni diferencojn inter hormoj k.t.p.

En nia lernejo, post trisemestra E-leciono, lernantoj vojaĝas al la mondo per Esperanto. Dum la vojaĝo ili aplikas Esperanton kaj kelkaj el tiuj forte sentas, ke daŭre lerni Esperanton indas. Kvankam Esperantujo estas eta planedo, ene de ĝi, ili sufiĉe profunde spertas varman amikecon dank' al Esperanto. Tiu sperto alvokas sekvan motivon esti invitita kiel gvidanto kaj preleganto aŭ refoje vojaĝi eĉ sole al la mondo. Ju pli oftas internacia renkontiĝo, des pli kreskas motivo. Tio cirkule interfunkcias kvazaŭ dentradoj.

Rilate al tio, la plej grave validas, ke en Esperantujo oni lernas ne nur lingvon, sed ankaŭ lernas, kio estas komuniki por kompreni aliajn kaj esti komprenita de aliaj. Egaleco de nia lingvo Esperanto ebligas tian interkomunikadon, ĉefe kun paco.

Resume, Esperanto ne estas ĉies dumviva lernado. Tamen, se iu povas gustumi, ke Esperanto estas la plej bunta kaj malferma popola universitato, kie oni povas lerni kaj ĝui kulturojn de la tuta mondo, certe multaj prenos Esperanton kiel sian dumvivan lernadon.

3. Malgraŭ tio, nur malmultaj esperantistoj estas en la mondo.

- 1) Kial multaj homoj en la mondo ne lernas Esperanton?
- 2) Kial multaj homoj eĉ ĉesas ĝian lernadon?

Oni ne scias, kio estas Esperanto, kaj eĉ demandas, ĉu Esperanto ankoraŭ vivas. Eĉ se ili scias, ke Esperanto vivantas, ili pretekste diras: Mi ne havas tempon por lerni Esperanton. Ja, por okupiĝi pri Esperanto, oni bezonas tempon, ĉar ĝi estas almenaŭ lingvo. Plie, lerni lingvon sincere malfacilas. Sukcesi aŭ ne, progresi rapide aŭ ne. Kvankam Esperanto estas multe pli facila ol aliaj lingvoj, oni devas dediĉi tiom da tempo por sukcese uzi ĝin. Pro tio, personoj povus suferi dum la lernado ne nur ĝui.

Kiuj povus helpi tiujn? Kiu allogaĵo alkroĉas personojn al Esperanto? Ĉu gajni monon? Ĉu akiri profesion? Ne! Nur scivolemo kaj espero al la mondo povus

motivi nin daŭre lerni Esperanton. Laŭ mi, komunumo estas utila helpilo. Ni sentas ion specialan, kiam ni komunikigas Esperante kun fremdlandanoj. Memfida, kurioza, komunuma, proksima kaj paca sento fluas. Tutmondanoj estas proksimaj en Esperantujo. Se oni spertas kaj gardas tiun senton ene de sia koro, oni neniam lasos Esperanton.

4. Rezulte

- 1) Ĉu vi daŭrigos lernadon kaj utiligon? (Se jes, kial?)
- 2) Ĉu vi volas propagandi al aliuloj? (Se jes, kial? Kiel?)
- 3) Ĉu Esperanto taŭgas por dumviva lernado? (Se jes, kiu flanko?)
- 4) Diru pri perspektivo (future) de via vivo kun Esperanto!

Kompreneble, mi jam tro envenas en Esperantujon. Mia vivo multflanke apartenas al Esperanto. Per Esperanto mi povas libere flugi al la mondo, renkonti geamikojn en la mondo, diskuti kun ili pri diversaj temoj, sperti aliajn kulturojn kun amikeco, ligi miajn fakojn kun samideanoj. Pro tio, mi ŝatus propagandi Esperanton, sed ne al ĉiuj, tamen al tiuj, kiuj havas intereson pri alternativaj vivo, ideo kaj revo. Por tiuj personoj, Esperanto estas tre taŭga kiel dumviva lernado ligante sian nunan okupon. Ekz. alternativaj lernejoj estas jam pretaj akcepti Esperanton, ĉar ili ĉiam cerbumas, kiel alternative vivi, instrui, lerni k.t.p. Se ili povus renkonti Esperanton ĝuste kiel alternativan fremdlingvon, la rezulto signifoplene eksplodos.

Mi dediĉadas mian tempon por ligi Esperanton kaj alternativan lernejon: Instrui Esperanton unue al instruistoj de alternativa lernejo, por ke ili mem gvidu kurson en sia lernejo. Doni diversajn ŝancojn al lernantoj, por ke ili profunde rendevuu kun Esperanto. Montri freŝan staĝon, por ke ili ĝuu Esperanton kaj ili mem organizu sies stilan kurson.

Sendube, Esperanto estas internacia. Mi havos okazon sperti internaciajn renkontiĝojn diversspecajn plej ofte kiel eble por aerumi min banaleblan. Sincere mi deziras min mem fariĝi bona esperantisto. ☸


La Espero

Movo de marŝo.

F. de Ménil
Teksto de d-ro L. L. Zamenhof



1. En la mond : on ven : is nov : a
2. Sub la sankt : a sign : o de l'Es :
3. Sur neŭ : tral : a lingv : a fun : da :




sent : o, tra la mond : o ir : as fort : a vok : o; perflug :
per : o, kolekt : iĝ : as pac : aj ba : tal : ant : oj, kaj ra :
ment : o, kom : pre : nant : e u : nu la a : li : an la po :



il : oj de fa : cil : a vent : o nun de lok : o flug : u ĝi al
pid : e kresk : as la a : fer : o per la : bor : o de la Es : per :
pol : oj far : os en kon : sent : o u : nu grand : an rond : on fa : mi :



lok : o. Ne al glav : o sang : on so : l : fant : a ĝi la
ant : oj. Fort : e star : as mur : oj de mil : jar : oj in : ter :
li : an. Ni : a di : li : gent : a kos : leg : ar : o en la :



hom : an tir : as fa : mi : li : on: Al la mond' e : tern : e mi : lit :
la po : pol : oj di : vid : it : aj, Sed dis : salt : os la obs : tin : aj
bor : o pac : a ne lac : iĝ : os, Ĉis la bel : a song : o de l'Hom :



ant : a Ĉi pro : mes : as Sankt : an har : mo : ni : on.
bar : oj per la Sankt : a Am : o dis : bat : it : aj.
ar : o por e rit



ter : na ben' e : fek : tiv : iĝ : os.

La tagiĝo



A - gor - du la bru - stojn, ho ni - a fra - tar', por
Post lon - ga mig - ra - do sur dor - na la voj', mi-



no - va pli vi - gla jam kan - to! Ĝi so - nu - po - ten - ce de
na - cis nin on - doj de l'ma - ro; sed ven - kis ni i - lin kaj



mon - toj al mar', a - non - cu al ĉi - u dor - man - to: ta -
ve - las kun ĝoj' al ver - da ha - ven' de l'ho - ma - ro. Post



gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', la om - broj de nok - to for -
lon - ga ba - ta - lo mal - dol - ĉa tur - ment', la ste - la stan - dar - do jam



ku - ras el mond'! Ta - gi - ĝo, ta - gi - ĝo ra - di - as en rond', la
flir - tas en vent'. Post lon - ga ba - ta - lo mal - dol - ĉa tur - ment', la



om - broj de nok - to for - ku - ras el mond'!
ste - la stan - dar - do jam flir - tas en vent'.

poez. GRABUWSKI Antoni (Pollando)
muz. BARAŬSKI

NOTO